

Le Congrès du Benelux à Ypres

La Beneluksa Kongreso en Ipro 23-25/9

Pli ol 70 esperantistoj partoprenis en la ĉi-jara Beneluksa Kongreso en Ipro. Ili venis el Angolo, Germanio, Nederlando, Francio, Svislando kaj el ĉiuj regionoj de Belgio por kune sperti la emociojn kaj sentojn de Paco.

Danke al Piet Glorieux, kiu sukcesis profiti la okazon por prezenti la Esperanto-movadon al la publiko, ni kune ĝuis la oficialan programon de la Internacia Tago de Paco en Ipro, urbo de paco. Ni ĉeestis koncerton de la fama koruso Vamos Pra Lutar en la iama preĝejo de Sankta Jakobo kaj, kompreneble, la "Last Post", ĉiutaga memoriga ceremonio ekde 1928, ĉe la Menenpoort.

Multaj aliaj turistoj venis per buso sabate, la 24-an de septembro, al Ipro. Mankis nur en la programo la etendado de la plej granda pacflago en la mondo sur la Granda Placo; la urbeŝtaro ne volis riski damaĝi pro la pluvo tiun gigantan flagon kudritan dum 200 horoj de 30 virinoj. Tio estis parto de nia sabata posttagmeza programo, sed ne nur. En la Buĉista Gildomo (14-a jarcento), ni renkontis per videokonferenco Taeko Osioka, japanino el Hiroŝimo naskiĝinta en 1947, kiu ĉiam okupiĝis pri civitanaj agadoj kontraŭ nukleaj armiloj. Tio

estis okazo konigi Esperanton al la ĉeestanta publiko, inkluzive de influaj homoj el la urbo. Kiki Tytgat, prezidantino de la Belga Esperanto-Federacio, parolis pri Esperanto kaj Piet intervjuis tiu ĉi gravan esperantistinon de Japanio pri ŝia agado.



Dimanĉe, ni vidis filmeton pri ŝi kaj de ŝi dum interesa diskuto inter ni. Multaj el ni bedaŭras, ke pro (interkontinentaj) aliancoj, ni, la homoj, ne plu havas la rajton libere decidi aŭ premi niajn registarojn por redukti nuklean energion. Aliflanke, la svisaj esperantistoj bedaŭras, ke financaj interesoj tro ofte superas la veran neŭtralecon de Svislando. Ni faris ankaŭ grandan paŝon por rekoni la diferencon inter milita agado, eĉ pli katastrofa venĝa ago, aŭ eĉ ekstremaj decidoj por devigi la finon de la milito, kiel en Ipro en 1918 kaj en Hiroŝimo, Dresdeno. Berlino, en 1944, ekzemple. Logiko de milito estas vera teruro.

Estis emocio dum la koncerto orientita, kompreneble, al la temo Paco, sed ankaŭ kun epokaj kantoj pri la morto aŭ malapero de soldatoj "kies reveno ankoraŭ atendas". Nun tio estas pli ol 100 jaroj poste (1918). Dum la lastaj 100 tagoj de milito, 600 000 soldatoj perdis sian vivon en la regiono. La urbo estis tute bombardita kaj preskaŭ tute detruita. La loĝantaro de la urbo duoniĝis falante de 32 787 al 16 908. Denove estas nun 34 988 loĝantoj kaj la malnova urbocentro estas rekonstruita idente. Sed ĉie en la regiono troviĝas militaj tombejoj, monumentoj, malĝojaj rememoroj, kiel la *Menenpoort* kun la nomoj de soldatoj mortigitaj aŭ ne trovitaj, el kiuj la plej multaj venis el Afriko, Aŭstralio aŭ Azio sub la flagoj de la Brita Imperio.

Emocioj kaj sentoj. Tio estis la komuna fadeno de la laborrenkontiĝo proponita de Mirejo Grosjean. Povi rekoni kaj paroli pri ili estas la komenco de konfliktoŝolvado (vidu

la ligilon ĉe *Edukado.net*). Dum ĉi tiu semajnfino mi multfoje havis sentojn de profunda tristeco.

Mi malfacile komprenas, kiel oni povas vivi en urbo, kiu faras turismon el sia malfeliĉo, kaj kiu ne havas alian elekton ol daŭre insisti pri la absoluta neceso disvolvi politikojn de paco. Mi do ankaŭ rekonis mian grandan bezonon de Paco ĉie kaj ĉiam en mia vivo. Tial, mi ŝatus, ke mia lando havu ministerion pri paco dotitan per granda buĝeto kaj respondecan pri paco kaj diplomatio, edukado, komerco, sano kaj ankaŭ malgranda buĝeto de defendo.

Kompreneble, ni, kiel kutime, ekzercis ankaŭ la akuzativon, ni kunvenis ĉirkaŭ loka lupolbiero, faris planojn por 2023 kaj 2024: publikigo de libro, vojaĝoj, kursoj, kongresoj ktp. Estis denove bona ŝanco fari novajn amikojn aŭ plifortigi ekzistantajn amikecojn.

Kiel kutime ĝi estis intensa.

Dankon al Piet Glorieux kaj An Olijslagers pro la perfekta organizado. Ankaŭ al ĉiuj, kiuj proponis, lige kun la Pactemo (aŭ ne), poemon, kantojn, altnivelajn prelegojn, interesajn ludojn, origami-faldadon kaj muzikon sur tipaj citroj! De Iep, la gastejon, ni aplaŭdis pro ĝia amika bonvenigo en iliaj lokoj kaj por la bongustaj manĝoj.

Marilyn DROOG

